

# Brazilei

jaro 3 n-ro 11 2009

## Zsófia Kóródy

Intervjuigás



Interkultura Centro  
Herzberg



Dennis Keefe  
vokas homojn  
al provlecionoj



Omaĝo  
al Prof. Sylla Chaves  
(1929-2009)

La plej grava porinstruista retejo en  
Esperantujo reformiĝas kaj bezonas  
vian monhelpon. Vizitu la suban ligilon  
kaj sciu kiel helpi.



[www.edukado.net](http://www.edukado.net)



# Enhavo

## Parolo de spertulo

D-ino Zsófia Kóródy 06

## Omaĝe (1-a parto)

Mia genia amiko 14

## Omaĝe (2-a parto)

Kohera kaj Fidela 22

Prelego pri Esperanto en PUC-Campinas 19

Problecionoj kaj Esperanto 25

En la klason venis nova vento 31

Surprize kurioza kaj instrua prelego 36

Trejnaranĝo por kursgvidantoj de E-o 41

**Eldiroj** 04

**Karaj geinstruistoj** 05

**Reteja mondo** 20

**Bildinstrue** 21

**Traduko-defio (komentoj)** 42

# ilei

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

Faka asocio pri instruado aliĝinta al  
Universala Esperanto-Asocio (UEA)  
[www.ilei.info](http://www.ilei.info)



**Provizora sekciestro:** José Roberto Tenório  
**Sekretariino:** Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias  
ĉefe per interreto ĉe la adreso

**[www.ileibr.org](http://www.ileibr.org)**  
[geinstruistoj@ileibr.org](mailto:geinstruistoj@ileibr.org)  
[biblioteko@ileibr.org](mailto:biblioteko@ileibr.org)  
[butiko@ileibr.org](mailto:butiko@ileibr.org)

### **Poŝtadreso por korespondado**

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera  
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo  
Telefono: (11) 6155-7978

## **Brazilei**

Aperas kvarfoje en la jaro kaj estas eldonata  
de Brazila Sekcio de ILEI

**ĉefredaktanto:** José Roberto Tenório  
**grafikaranĝo:** José Roberto Tenório  
**kontakto:** [revuo@ileibr.org](mailto:revuo@ileibr.org)  
**kontrollegantoj:** José Dias Pinto,  
Eurico A. Ribeiro, Edson Ponciano.

### **Kunlaboris en tiu ĉi numero:**

David Bianchini,  
Dennis Keefe,  
Neide Barros Rêgo,  
Paulo Sergio Viana  
kaj Zsófia Kóródy.

## *Eldiroj de sylva Chaves*



(1929 - 2009)

“Al progresantoj mi volas montri, ke por verki trafajn mesaĝojn nepras al beleco kunigi simplecon. En la lingvo de Zamenhof eblas simple pritrakti kompleksajn kaj seriozajn temojn. Kaj Esperanto devas resti tia por fariĝis la lingvo de la Tria Jarmilo.”

“La dulingva vortaro estas la plej granda malmiko de la tradukisto.”

“En miaj lingvo-instruaj verkoj mi ĉiam klopodis esti kiel eble plej neŭtrala. (...) Mi tamen ne volas imiti la senkoloran neŭtralecon de tiuj, kiuj senproteste akceptas la maljuston kaj kruelon de la mondo. Mi fariĝis esperantisto pro tio, ke Esperanto por mi estas pli ol lingvo. Ĝi estas ilo por estigo de pli bona mondo. Kaj la neŭtraleco, kiun mi akceptas, estas tiu de Zamenhof, kiu rifuzas la limigojn de la religioj kaj preĝas al la “potenca senkorpa Mistero” kaj Fortego de la mondon reganta”.

“La nomojn kaj la vizaĝojn de multaj el miaj helpintoj kaj helpitoj mi ne plu memoras. Nur la travivaĵojn, kie ili aperis. Kaj mi estas certa, ke gvida mano alproksimigas homojn laŭbezone. Kaj ankaŭ, ke la homa vivo havas kialon kaj celon. Kaj ankaŭ travivaĵojn, en kiuj oni pli multe lernas ol en universitato.”



## Malgranda aspekte sed peniga intelekto

Jen la dua ĉi-jara n-ro de via ŝatata revueto. Kiam antaŭ du jaroj venis al mi la ideo redakti informilon pri instruagado, mi decidis pri malgrandformata publikigaĵo, supozante, ke tiamaniere la laboro ne estus tiel granda. Alveninte tamen al la 11-a eldono de Brazilei, pli kaj pli evidentiĝas, ke redakti eĉ malgrandan eldonaĵon estas peniga laboro, se per ĝi oni celas regali legantojn per interesaj kaj praktikaj tekstoj.

Instigate de sinceraj reagoj de kelkaj amikoj, mi plu strebas, laŭ miaj kapabloj kaj liberaj horoj, evoluigi tiun ĉi komunikkanalon inter la Sekcio kaj la enlanda instruistaro. La komunikado ankoraŭ ne estas efika, pro vintrumado de la Sekcio mem kaj pro emo de multaj kursgvidantoj agadi izole. Tia situacio estas iom maltrankvila, ĉar se ni ne atentu ankaŭ la kernon de la porinstruista laboro, ties komunikkanalo riskos fariĝi pli reliefa ol la komunikservo mem.

Okaze de la ĉi-jara Brazila Kongreso de Esperanto, la Sekcio provos kunvenigi anojn kaj simpatiantojn cele pridiskuti la plivastigon de enlanda porinstruista servejo. Via partopreno estos tre grava.

Ĝis tiam kaj agrablan legadon!

## Admiro preter la kompreno

Laŭdire iam Charles Chaplin, okaze de publika renkonto kun la fama sciencisto Albert Einstein, diris, ke la popoloj ilin admiras, sed pro malsamaj kialoj: lin mem, ĉar lia laboro estas komprenata al ĉiuj, kaj la scienciston, ĉar lia laboro apenaŭ estas komprenata al ili.

Same pri nia ĉi-numera spertulo, d-ino Zsófia Kóródy. Ni ankoraŭ apenaŭ taksis la gravecon de tiuj novtipaj ekzamenoj de Hungara Ŝtata Ekzamencentro (ITK) partnere kun Universala Esperanto-Asocio (UEA), kaj prizorgataj i.a. de nia intervjuito, kiu mem estas rajtigita ekzamenanto de ITK. Ni scias tamen, ke la ĝisnunaj atingoj de tiu rekono estas laborfrukto de kompetentaj homoj, kies pensojn kaj aktivadojn indas koni, eĉ se tre resume.

# spertulo

D-ino **Zsófia**  
**Kóródy**



Zsófia Kóródy estas hungara Esperanto-instruisto kaj unu el la kernaj aktivuloj de la Interkultura Centro Herzberg (ICH) en Germanio. Ŝi diplomitiĝis pri Esperanto en la ELTE-Universitato en Budapeŝto. Dum pluraj jaroj ŝi estis vicprezidantino de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Krome, ŝi estas sekciestro kaj komitatano de la plej granda landa sekcio de ILEI (Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj, AGEI). Kiel rajtigita ekzamenanto de ITK (Hungara Ŝtata Ekzamencentro), ŝi estas membro de la nova UEA-komisiono, kiu prizorgas la novtipajn ekzamenojn de ITK/UEA.

**Brazilei:** *Kutima demando: kiam kaj kiel vi esperantistiĝis?*

**Zsófia:** Tute hazarde. En 1976 Kiel studento de ELTE-Universitato en Budapeŝt krom miaj du ĉeffakoj, la hungara kaj angla, mi interesiĝis ankaŭ pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, sed pro administradaj problemoj kaj eraro, mi ekstudis interlingvistikon-esperantologion. Mi tute ne bedaŭris poste! Dum miaj studoj en la Esperanto-fako mi rimarkis, ke tiu lingvo ne estas nur iu lingvoprojekto analizebla, analizenda far sciencistoj, sed ekzistas tre interesa komunumo de ĝiaj parolantoj. Post partopreno en mia unua IJK (Veliko Trnovo, BG, 1978) esperanto-movado estas parto de mia vivo.

**Brazilei:** *Kies plej interesan E-lecionon vi jam ĉeestis kaj kiam iun tian vi mem gvidis?*

**Zsófia:** Kompreneble la plej decida travivaĵo por mi, tiama studento en ELTE estis la lecionoj de mia profesoro, István Szerdahelyi. Sed ankaŭ de mia kolemino, Zsuzsa Barcsay mi multe lernis. Impresis min ankaŭ la instrumetodo de la t.n. 'fiŝkursoj', gvidataj de Jozefo Horváth kaj Peter Radoŝ. Por fariĝi pli kaj pli bona en instruado de Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj mi serĉis ĉiun eblon por spertiĝi, partopreni metodikajn seminariojn, fini postdiplomajn studojn.

El miaj propraj kursoj mi mencias kelkajn: someraj kursoj por junularo, preparo de miaj gimnaziaj lernantoj al abiturienta ekzameno, preparo de pluraj por trapasi ŝtatan lingvan ekzamenon, rektmetodaj kursoj por internaciaj grupoj, semajnfinaj intensaj kursoj, rapidkursoj por dubemuloj, ktp. Por mi ĉiu leciono estas nova defio, nova travivaĵo. Kiu el tiuj multaj estis interesaj? Prefere demandu miajn iamajn aŭ nunajn kursanojn!

**Brazilei:** *Kiu el viaj poresperantaj agadoj prezentiĝis plej defie al vi?*

**Zsófia:** Estas malfacile elekti nur unu, la plejan. Kompreneble la unuaj memgvidataj lecionoj, kursoj, kiam mi ankoraŭ estis studento en la universitato. Kaj la unua laborloko post la akiro de mia diplomo: ĉe Hungara Esperanto-Asocio mi fariĝis respondeculo pri tutlandaj instru- kaj ekzamenaferoj. La posteno estis kreita por mi – do granda defio! Fariĝi vicprezidanto de TEJO, organizi ILEI-konferencon en 1981, kunorganizi IJK kaj UK en 1983 en Hungario, eklabori por Esperanto



kaj Germana Esperanto-Asocio en Herzberg, elektigi estrarano de ILEI, ktp., ktp.

Estis kaj estas multaj defioj. Kaj bone, ke estas, ĉar sen novaj defioj oni faras rutinan, kutiman laboron, kiu post certa tempo detruas la animstaton.

**Brazilei:** *Kiel vi venis al ICH? Aŭ ĉu oni diru: kiel ICH venis al vi?*



fotaro de ICH - <http://ic-herzberg.de>

Sidejo de Interkultura Centro Herzberg - ICH

**Zsófia:** Mi venis al Herzberg

en 2003 por prelegi, helpi en trejnsesio kaj ordigi librojn, gazetojn. Interkultura Centro Herzberg (ICH <http://ic-herzberg.de>) estas la frukto de bona kunlaboro kun Peter Zilvar, motoro de la loka E-agado, kaj iniciato mia en 2004: transigi la domon de liaj forpasintaj gepatroj al E-Centro, kiu ofertas servojn ne nur al lokaj Esperantistoj sed internaciskale, al la tuta Esperanto-movado.

**Brazilei:** *Kiom grava estas ICH por via agado kiel pedagogo kaj kiel esperantisto?*

**Zsófia:** Ege grava, kiel bebo al patrino. Oni devas ĉiutage 'nutri', helpi ĝin, investi por ĝia estonto, teni la manon kaj gvidi ĝin al prospera, esperplena futuro. Mi ne apartigite estas esperantisto kaj pedagogo. Mi estas tio kune. Krom esti konsilanto, fakkompetentulo mi devis kaj devas esti por ICH ankaŭ konstrulaboristo, teknikisto, metiisto-riparisto. Se mankas monrimedoj kaj helpantaj manoj, oni devas esti mem kreema. Tion postulas ankaŭ la bonŝanco, kiu estas la akompananto de tiu grandioza projekto. El la konstanta, persista laboro venis la rezulto: la evoluo de la loka grupo, elkresko de la movada centro al internacia kulturcentro, biblioteko kun kursejo kaj klerigejo de instruistoj, kaj la tuta poresperanta agado kune kun la ĝemelurbo – jen ĉio en kombinaĵo, kiu estis sufiĉe grava kaj konvinka al la urba registaro por aldoni la kromnomon al la nomo de la urbo. Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo (<http://herzberg.de>).

Taskoj, inventemo, ideoj, serĉado de vojoj, baraktado sur tiu vojo – ofte kontraŭ esperantistoj mem, - jen la gravaj punktoj de nia agado.

**Brazilei:** *Ĉu Esperanto fariĝis via ĉefa profesia okupo?*

**Zsófia:** Jes, ni povas diri. Semajne en kelkaj horoj mi praktikas ankaŭ miajn aliajn du fakojn, instruas la anglan kaj eĉ la hungaran, sed Esperanto plenigas la reston de la tagoj. Loĝante en la Esperanto-Centro mem, mia ĉiuaga vivo neniel estas apartigebla de mia profesio. Mi kaj la Centro kun la kunagantoj, helpantoj estas deĵorpreta tuttage, tutjare!

**Brazilei:** *Vi estas la ĉefmotoro ĉe ICH kaj samtempe prezidanto de AGEI. Kian rolon ludas nun AGEI antaŭ la multfakaj, inkluzive porinstruistaj, agadoj fare de ICH?*

**Zsófia:** ICH estas ĉefe kursejo, ekzamenejo kaj klerigejo por kursestroj, instruantoj, instruistoj. Ni zorgas kaj pri la lingva kaj pri la faka trejnado, spertinterŝanĝo, pluklerigado de niaj kolegoj. Tiu laboro bone kongruas kun la agado de AGEI kaj bone servas la instruistojn.

**Brazilei:** *Via nomo distingiĝas ankaŭ kiam la temo estas ALTE, ITK kaj Origo. Por neeŭropaj esperantistoj tiuj novaj mallongigoj ankoraŭ aspektas iom malprecize. Bonvolu klarigi kio estas la komuna punkto inter Esperanto kaj tiuj tri mallongigoj?*

**Zsófia:** Temas pri la novaj lingvoekzamenoj de UEA konformaj al la postuloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), kiu fiksas la normojn por lingvoinstruado kaj pritaksado. KER estas grava ankaŭ por ekstereŭropanoj, ja ofte ankaŭ ili studas en eŭropaj lernejoj, universitatoj, serĉas laboron, ktp., kaj bezonas kompareblajn lingvajn kapablojn.

ALTE (Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo <http://alte.org>) estas la internacia organizaĵo kompetenta pri pritaksado de ekzamensistemoj laŭ KER.



ITK (Idegennyelvi Továbbképző Központ <http://itk.hu>) estas Ŝtata Ekzamena Centro en Hungario, kiu jam de jardekoj estas ofertanta Esperanto-ekzamenojn en baza, meza kaj supera niveloj. Ekde septembro 2006 ITK adaptis sian 3-gradan Esperanto-ekzamensistemon (ĝi estas nomata Origo) - al la novaj normoj de KER, akiris akreditigon por ĝi de la hungara ŝtato kaj ankaŭ submetis ĝin al kvalita kontrolo (2008) far Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE).

UEA kaj ILEI ellaboris novan internacian version de tiu Origo-tipa ekzamsistemo en niveloj B1, B2 kaj C1 kaj subskribis kontrakton por kunlabro en ekzamenado en 2008.

**Brazilei:** *Kiaj estas la unuaj rikoltoj de la novtipaj ekzamenoj de ITK/UEA?*

**Zsófia:** La unuaj reagoj al la nova ekzameniĝeblo estas bonaj, la ekzamenoj fariĝas popularaj. Ekde januaro 2009 okazis kvar sesioj, dum IJK kaj UK estos la nova ŝanco trapasi ilin. Regularon, postularon kaj liston de estontaj sesioj kun aliĝilo vi trovas sur la hejmpaĝoj de ITK (<http://itk.hu>) kaj <http://edukado.net>. Multaj komprenas, ke estas grave montri, ke Esperanto estas samrajta, samranga kun aliaj fremdaj lingvoj.



**Brazilei:** *La ekzamenoj de ILEI/UEA estas limigitaj al iuj internaciaj E-eventoj kaj al kelkaj eŭropaj E-aranĝoj. Ĉu estas iu strategio, flanke de la respondeculoj pri la ekzamenoj de ITK/UEA, por rompi tiun eŭropan kadron kaj popularigi la novan testo-sistemon en aliaj partoj de la mondo?*

**Zsófia:** Jes, vi pravas. Mi jam menciis, ke KER-ekzamenoj gravas ankaŭ por neeŭropanoj. Sed antaŭ ol anonci sesion, ni devas prizorgi trejnitajn, rajtigitajn ekzamenantojn. Do strategie nun gravas ilia trejnado, pluklerigado, ktp. kaj poste estos plivastigeblaj la sesioj.

**Brazilei:** *Ankoraŭ kompare kun la ekzameno-sistemo de ILEI/UEA, kies ekzamenantaro konsistas el rajtigita rondo de diversnaciuloj, kiuj konsistigos la grupon de ekzamenistoj de la novtipaj ekzamenoj de ITK/UEA?*

Kaj TK kaj ALTE postulas la samon en Esperanto, kiel por ekzamenoj en aliaj fremdaj lingvoj. Ekzamenanto devas esti diplomito en sia fako, havi atestilon pri altnivelaj E-lingvaj kapabloj, esti instruisto de fremdaj lingvoj, havi plurjaran lingvoinstruistan kaj ekzamenadan sperton.

**Brazilei:** *Ĉu vi opinias, ke la nunaj lerniloj kaj kursejoj estas taŭgaj por prepari kandidatojn por la novtipaj ekzamenoj de ITK/UEA, laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro?*

**Zsófia:** Unuavice, oni devas bone koni la KER-libron (eldonis UEA en decembro 2007 en E-traduko), la tabelojn, nivelojn. La nunaj E-lernolibroj ankoraŭ ne estas verkitaj laŭ tiuj normoj. Kelkaj landaj asocioj jam provas adapti siajn naciajn E-ekzamenojn al la novaj normoj. La preparon de kandidatoj por Origo-ekzamenoj tamen jam nun helpas la libro kun modeltestoj (Esperanto de nivelo al nivelo, ITK Budapest, 2008) kaj ankaŭ sur la hejmpaĝo de ITK estas troveblaj en ĉiuj tri niveloj specimenoj kun solvoj, eĉ materialo por aŭda kompreno.

**Brazilei:** *La gvidlibro pri la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA havas 34 paĝojn, kaj tiuj de ITK/UEA 136 paĝojn. Kion signifas tiu kiomo da paĝoj?*

**Zsófia:** La KER-libro estas 262-paĝa, eldonis ĝin la Konsilio de Eŭropo, Strasburgo, kies E-lingvan tradukon eldonis UEA en 2007. Ĝi fiksas la normojn por fremdlingva lernado, instruado kaj pritaksado tre detale, aparte por ĉiuj lingvaj kapabloj (komprenado, parolado, skribado), por diversaj komunikaj taskoj kaj celoj, apartigante leksikajn, gramatikajn, semantikajn, fonologiajn, ortografiajn, ortofonajn kapablojn, kaj priskribas multajn aliajn gravajn elementojn de lingvolernado, ekzamenado,

La libro pri la lingva ekzamensistemo Origo (Esperanto de nivelo al nivelo, ITK Budapest, 2008) estas 136 paĝa, enhavas la tutan postularon kun temaro, taskotipoj, longeco, akireblaj poentoj, modeltestojn kun solvoj kaj por la skriba kaj por la parola partoj.

**Brazilei:** *Laŭanoncite, la skriba kaj parola partoj de la novtipaj ekzamenoj de ITK/UEA estas plenumebaj aparte. Kiel tio funkcias?*

**Zsófia:** Jes, kandidato povas aparte plenumi dum iu ekzamensesio aŭ la skriban aŭ la parolan partojn, aŭ provi ambaŭ, do la kompletan. Se aperte plenumas la ekzamenon, ricevas atestilon pri la sukceso, kaj en sekva fojo povas aldoniĝi la alia parto.

**Brazilei:** *Kial la skriba parto nepre devos okazi samtempe en diversaj lokoj?*

**Zsófia:** La ellaborado de skribaj taskoj estas granda laboro por la testverkistoj. Unu testkompleto enhavas plurajn taskojn kaj la skriba taskaro daŭras 2-4 horojn depende de la nivelo. Se dum unu sesio en diversaj partoj de la mondo okazas ekzameno, la skriba parto devas esti samtempe por ne foruzi la taskojn por nur kelkaj homoj, ne perdi la materialon por manpleno de ekzamenatoj, kaj ankaŭ por eviti transdonon de informoj, misuzon de la materialo.

**Brazilei:** *Kiu estas via konsilo por interesiĝantoj pri la novtipaj ekzamenoj de ITK/UEA?*

**Zsófia:** Preparu vin bone, uzu la menciitajn provtestojn, lasu mezuri viajn lingvajn kapablojn laŭ la normoj validaj por aliaj fremdaj lingvoj, montru, ke ankaŭ el tiu lingvo eblas plenumi la samon. Esperanto ricevis bonan ŝancon per tiu ekzameno, ni devas montri, ke estas kandidatoj, por kiuj ankaŭ Esperanto-atestilo havas valorojn!

**Brazilei:** *Baldaŭ okazos balotado ĉe ILEI. Viaopinie, kiu estu la prioritato de la nova gvidantaro por ke la Ligo rekonkeru sian iaman prestiĝon?*

**Zsófia:** Por havi ŝancon por Esperanto kiel rekonata, egalrajta lingva komunikilo, ni devas pli atenti la ŝancojn por lerneja instruado kaj fortigi la agadon por kapabligado de lingvoinstruistoj, ja sen kvalifikitaj fakuloj ni ne havos ŝancon por serioza institucia rekono de nia lingvo.

Dankon pro viaj demandoj!



## Gogo, la testudo – Martin Weichert

n-ro 6, sep 1987



# Mia genia amiko

## Sylla Chaves

Neide Barros Rêgo

La 3-an de julio 2009



Neide Barros Rêgo

Paroli aŭ skribi pri Sylla Chaves estas por mi samtempe plezura kaj dolora afero. Plezura ĉar mi gardas pri li multajn bonajn rememorojn. Dolora pro tio, ke li ne plu estas inter ni. Neniam plu ni povos revidi tiun simpatian senharulon, aŭdi lian voĉon kaj peti al li klarigon pri niaj duboj. Mi por ĉiam memoros pri tiu neforgesinda amiko.

Eksedzo, sen filoj, li vivis sola en sia apartamento en Botafogo, Rio kun la bonkora servistino Vera. Mankis nur tri tagoj por ke Sylla kompletigu 80 jarojn, kiam li subite forpasis la 30-an de Majo 2009.

Filo de Tullio kaj Zillah Chaves, ambaŭ poliglotoj kaj poetoj, li naskiĝis en la 2-a de Junio 1929. Li tre amis siajn gepatrojn kaj siajn gefratojn Mário, Lívio, Flávio, Lúcia kaj Marília.

Li estis 7-jara kiam liaj gepatroj kaj pli aĝaj gefratoj eklernis Esperanton en sia sudbrazila naskiĝurbo, Santana do Livramento.

En 1937, li kun la familio transloĝiĝis al Rio-de-Ĵanejro kaj tie Sylla ekstudis Esperanton sola, per la libroj kaj kajeroj de sia pli aĝa fratino. Kaj neniam plu forlasis la lingvon kreitan de D-ro Zamenhof en 1887.

Li diplomiĝis pri juro en 1954 en Rio; studis politikajn sciencojn en Parizo em 1954/56; kaj magistriĝis pri komunikado en Kalifornio, 1970/72.

Inter 1978 kaj 1982 li prezidis Brazilan Esperanto-Ligon. Dum

du monatoj li estis invitita profesoro en la Instituto pri Kibernetika Pedagogio de la Universitato de Paderborn (Germanujo). Dum naŭ jaroj li partoprenis en la Akademio de Esperanto.



Sylla Chaves (1929-2009)

Li instruis publikajn rilatojn en Fondaĵo Getúlio Vargas, kie ankaŭ laboris Amarílio Carvalho kaj Aloísio Sartorato. Ilin alproksimigis Esperanto.

Ankaŭ pro Esperanto mi konis Sylla Chaves, tiun neordinaran personon. Mi opinias ke estos malfacile iu superi lin.

Ni kunvivadis longatempe, dum renkontiĝoj, kongresoj, prelegoj kaj festoj, precipe en Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE), Rio de Janeiro; en la lasta jardeko multe pli okaze de mia partopreno en televidprogramoj (Gutoj de Esperanto) kaj farado de videoj, KD-oj, DVD-oj ktp.

Kiom valoraj estis la instruoj, kiujn mi ricevis de Sylla okaze de la kurso, kiun li gvidis en KKE, en 2002, pri “Traduko de poeziaĵoj kaj de muziktekstoj”!

En 2006 kaj 2007, ni intense laboris kune, dum unu jaro kaj duono, por organizi la antologiojn *Brazila Esperanta Parnaso* (BEP) kaj *Poesias Escolhidas do Brazila Esperanta Parnaso*, komputile presaranĝitaj de José Tenório kaj eldonitaj de Oportuno.

Tiucele ni tradukis poemojn kaj kolektis informojn pri la diversaj poetoj (vivantaj kaj mortintaj), serĉante fotojn, verkante leterojn, tekstojn, babilante multfoje per telefono kun homoj de la tuta Brazilo kaj ankaŭ okazigante recitalojn. Dum la laboro ni havis multajn ĝojojn kaj ankaŭ malĝojojn, sed la ĝojoj estis la plejmulto.

En intervjuo publikigita en la revuo *Brazila Esperantisto* (Januaro/Marto 2004), Sylla asertis:

*La tria fulme brila Esperanta talento estas Neide Barros Rêgo. Kaj pri ŝi mi plej multe fieras, ĉar mi povis akompani, paŝon post paŝo, ŝian marŝadon de la portugallingva Parnaso al la Esperanta. Unue, kiel deklamantino, poste, kiel premiata poetino, kaj nun eĉ kunigante belan kantistinan voĉon al la prezentataj poeziaj tekstoj.*

*Dank' al ŝi mia vidbendo "Plurspecaj Eroj por Artaj Vesperoj" estis premiita en la belarta konkurso de Universala Esperanto-Asocio, en 2002, kies rezult-anonco okazis en Fortalezo.*

Venintaj de li, tiuj vortoj multe fierigas min.

En 1991 li ricevis la premion "Onisaburo Deguĉi" (Japanujo) "por uzado de Esperanto por monda Paco kaj la homara feliĉo", kaj en 1992 fariĝis honora membro de UEA.

Surbaze de propono mia al la prezidanto de la "Academia Fluminense de Letras", Edmo Rodrigues Lutterbach, la nomo de Sylla estis aprobita por la klaso de Sociaj Sciencoj. En la antaŭtago de sia forpaso, Sylla diris al mi per telefono, ke en sia baldaŭa enposteniĝo, li prelegos pri la engaĝinta poezio.

Lia entuziasmo estis facile konstatebla. Sylla Chaves, tre laborema, estis ne nur idealisto sed ankaŭ realiganto. Lia verkado estas riĉa kaj varia. Li estis kompetenta profesoro kaj talenta poeto.

Klarega parolmaniero, perfekta prononco, sentema animo, kiam li deklamis li ĉiam emociiĝis kaj emociigis nin.

Kelkajn tagojn antaŭ ol morti, li tradukis kune kun Affonso Soares mian soneton "Pietà", ĵus publikigitan en la revuo "O Reformador" kaj, en sia lasta semajno, li esperantigis mian poemon "Respondo", kiun mi baldaŭ publikigos (dulingve) en mia libro "Rikolto".

Li havis tiom da kvalitoj!... Talenta, kompetenta, profesoro de organizo kaj metodoj, li fiksas limtempojn kaj celojn kaj plenumis ilin. Li laboris senĉese pere de sia komputilo. Pro timo al virusoj li ne instalas Interreton en sia aparato. Li uzis ĝin pere de la komputilo de Alfredo Aragón, lia sindediĉa sekretario.

Mia karega amiko Sylla, kun kiu mi babilis ĉiutage per telefono plurfoje! Kaj kiom mi lernis per ĉiu babilado! Kelkfoje Sylla telefonis kaj mi forestis, do li profitis la okazon por peti al Walmir, mia edzo, lian opinion aŭ konsilon pri aferoj, kiujn li pensis aŭ imagis.

Esperanta movado estis lia konstanta zorgo. Ekzemple, la konsisto de la nuna estraro de BEL estis propono lia. Li estis kuraĝa homo. Tre edukita kaj klera persono. Ni ĉiuj admiris Sylla kaj lin respektis.

Li multe helpis min en la farado de la DVD "Neide kantas", en la



elekto de la muzikoj kaj eĉ esperantigante komponaĵojn laŭ mia peto. Li bele prezentis min.

Krom la portugala, li bone parolis la hispanan, la anglan, la francan kaj Esperanton. Li studis la araban, la germanan kaj la rusan. Li retuŝetis mian prononcon en la rusa kaj en la germana por kanto kaj por deklamado.

Li kompilis kanzonojn de preskaŭ la tuta mondo kaj publikigis ilin kun la respektivaj partituroj en la libro *Cent Jaroj da Kantado*. Li verkis siajn komponaĵojn per la helpo de buŝorgeneto.

Kiom da horoj, tagoj kaj monatoj Sylla perdis farante muzikaranĝojn de la filmoj “Plurspecaj eroj por Arta Vespero”, “A sonoridade do Esperanto” kaj “Neide kantas”!

Esperanto multe ŝuldas al li.

Kvankam ege okupata, Sylla neniam rifuzis klarigi niajn dubojn. Li estis nia plej kompetenta revizianto. Perfektiĝema en sia verkado, mi havas garditaj plurajn leterojn liajn. Li ĉiam respondis leterojn senditajn al li kaj li sendis kopiojn al mi. Kun kia plezuro mi kunlaboris en la revizio de lia *Oportuna Poŝvortaro* kaj mi estis kunlaboranta en lia farata “Vocabulário Esperanto/Português”.

La lasta prelego lia, kiun mi ĉeestis en Petropolo, estis mirinda. Tiam, li faris retrospektivon de sia vivo, parolis pri landoj kaj organizaĵoj, kie li laboris, kiel UN, UNESKO.

Ŝajnas, ke li antaŭsciis pri sia baldaŭa morto. Pro tio, li dediĉis sian tutan tempon al Esperanto. Neniam promenis, neniam amuziĝis kaj ĉiam aktualigis sin pri eksterlandaj aferoj. Li spektis TV-programojn rekte parolatajn en la franca.

Lastatempe li estis malsana kaj malfacile enspiris; li uzis multajn medikamentojn, konsultis kuracistojn kaj faris plurajn ekzamenojn.

Li vivis kun malgranda monprovizo. Li estis ŝparema homo kaj gastigis en malmultekostaj hoteloj. Malgraŭ tio li vojaĝis al aliaj urboj kaj ŝtatoj por prelegi en renkontiĝoj.

Tre kurioza estis la deziro de Sylla. Li informis al ni, ke li ŝatos esti kremaciita, kaj poste ke liaj cindroj estu ĵetitaj sub arbo nomata kambuka’. Li igis min promesi, ke mi tiam deklamos tiukaze. Mi konsentis.

Li esploris pri la ekzisto kaj fotoj de kambuka'. Li sciis, ke en la bieno de KKE, en Rio-de-Janeiro, en la kvartalo Bangu' estas malgranda arbo de tiu frukto. Li verkis belan soneton, legis ĝin telefone kaj poste sendis ĝin al mi.

### **Omaĝoj al Sylla**

Feliĉe kelkajn jarojn antaŭ lia forpaso mi omaĝis lin. Unue nomumante Sylla Chaves mian modestan Esperantan bibliotekon. Poste per organizado de la recitalo "Ao mestre Sylla, com carinho" (Karese, al majstro Sylla).

La omaĝo okazis la 6-an de Majo 2005, en la sidejo de KKE. Tie ĉeestis du fratoj kaj du bofratinoj liaj: Mário kaj Rosita, Flávio kaj Marlene. Sylla fariĝis tre feliĉa. Tiam mi disdonis al la publiko presitan programon, kiu montris lian foton kaj informis pri li kaj lia verkaro. Mi invitis kelkajn gelnantojn miajn kaj koleginojn por deklami poemojn verkitajn de li. Estis ankaŭ prezentitaj muzikoj komponitaj de li, kantataj en la DVD "Plurspecaj eroj por Arta Vespero" (unua premio en la Belartaj Konkursoj 2002 de UEA, kies rezulto estis anoncita en la 87-a UK, en Fortalezo, Brazilo).

Per letero mi dankis al li pro la revizioj de miaj poemoj kaj prozaj tekstoj; ankaŭ pro la invito al mi por partopreni en liaj didaktikaj kaj artaj laboroj. Bedaŭrinde mi ne trovis tiun leteron en mia komputilo, nek la paperan version.

Ni ĵus omaĝis lin en KKE, en la pasinta 26-a de Junio, kantante kaj deklamante liajn verkojn. La prezidanto de KKE, Givanildo Ramos Costa diris emociajn vortojn pri nia karmemora amiko.

Multaj gesamideanoj de Brazilo kaj eksterlande skribis mesaĝojn okaze de lia forpaso.



# Prelego pri Esperanto en PUC-Campinas



Maldekstre: Prof. David Bianchini dum prelego.

Sube: Monro de kelkaj esperantaj libroj.



La Fakultato pri Beletro de Pontifika Universitato Katolika de Kampino (PUC-Campinas: Rodovia D. Pedro I, km 136 - Parque das Universidades) okazigis la 20-an de majo prelegon en la portugala pri la temo “Naturaj lingvoj kaj artaj lingvoj - Esperanto”. Per tiu evento oni celis montri Esperanton en la scenejo de nuntempaj lingvoj.

La prelego estis prezentita en formo de diskutrondo, kaj ĝin partoprenis, en la matena parto ekde la 9h55, geprof-roj David Bianchini, ankaŭ membro de Kultura Centro de Esperanto, Jauranice Rodrigues Cavalcanti, doktorino pri lingvistiko, kaj Maria de Fátima Amarante, ankaŭ doktorino pri lingvistiko.

En la vespera parto ekde la 19h20, la evento kalkulis je la ĉeestoj ankaŭ de prof. David Bianchini, de prof-ino Cláudia Hilsdorf Rocha kaj de prof-ino Maria Inês Ghilardi Lucena, post-doktoriĝinta pri diskursanalizo. La evento okazis en ĉambro 800, konstruaĵo H-10 de la Universitata Tereno 1-a, kaj ĝin ĉeestis lernantoj, geinstruistoj de la Fakultato pri Beletro, kaj ceteraj interesiĝantoj.

Laŭ prof. David: *“Feliĉe la prelego fluis tre bone, kaj miaj vortoj plaĉis al ĉiuj. Mi kredas ke estonte oni havos studgrupon tie.”*

## Vortaro-blogo

Luís Alberto Coelho, el la urbo Tririveroj/RJ, sendis ligilon al tre interesa retejo, nome ‘vortaro-blogo’, de la emerita profesoro pri fonetiko en la Universitato de Londono, d-ro John Wells. Per tiu blogo la fama lingvisto starigas spacon por diskutado de problemoj leviĝantaj dum reviziado de sia vortaro “*Concise Esperanto kaj English Dictionary*”. Nepre vizitu ĝin ĉe <<http://vortaro-blogo.blogspot.com>>



## Lingva Kritiko

Alia saminteresa retejo, indikita de Aloísio Sartorato, el la urbo Rio/RJ, viziteblas per la adreso <<http://lingvakritiko.com>>. Ĝin kreis la svedo Bertilo Wennergren, membro de la Akademio de Esperanto kaj ties direktoro en la sekcio pri Ĝenerala Vortaro. Per sia retejo “Lingva Kritiko”, la akademiano invitas interesigantojn pri Esperantologio - studoj kaj notoj pri la Internacia Lingvo. Jen valora servejo por la historio kaj evoluo de la lingvo.





Teksto skribita surbaze de  
temo-ligilo sendita de la belgo  
**Germain Pirlot**

## Marsanoj invadas Esperantujon

Plia bildstrio estas tradukita al Esperanto. Ĉi-foje temas pri la bildversio de la fama sciencfikcia romano “La Milito de la Mondoj”, de la usonano H. G. Wells. La verko rakontas pri atako al la tero, fine de la 19-a jarcento, fare de marsanoj, kiuj volas konkuri la vizitatan planedon. Post kruelaj bataloj, en kiuj la teranoj ŝajnas por ĉiam malaperontaj, jen neatendite helpo alvenas: teraj bakterioj malsanigas kaj mortigas la invadantojn.

La verkon adaptis al bildstrio Ian Edginton kaj la bildojn desegnis D’Israeli, kiuj nun ĝin publikigis en la interreto por senpaga elŝutado. Tio donis al la hungaro Stefano Ŝafisto la ideon esperantigi ĝin.

La tuto enhavas 126 bildojn elŝuteblajn ĉe la adreso <<http://www.fenestro.extra.hu>>. Laŭ Stefano, kiu intencas esperantigi pliajn bildstriojn, “La teksto estas simpla kaj pro tio ĝi povas esti utila por komencantoj kaj amuza por ĉiuj”.

La retejo kreita por gastigi la tradukitajn bildojn estas tre plaĉa. Espereble la vizitantoj tie baldaŭ trovos novan specimenon de bildstrio tradukita al Esperanto.

Dume invitu viajn lernantojn ĝue kunigi legadon kaj lernadon per konatiĝo kun la traduko de “La Milito de la Mondoj”.

# Kohera kaj fidela

Sylla Chaves (1929-2009)




Foto: A. Sartorato

Forpasis la 30an de majo 2009 la eminenta esperantisto Sylla Chaves: profesoro pri Komunikado, en la fama klerigejo Fondaĵo Getúlio Vargas dum pli ol 40 jaroj, edukisto, poeto, tradukisto, vortaristo, preleganto, aŭtoro de popularaj lerniloj, iama prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (1978-1982), membro de la Akademio de Esperanto (1986-1995) kaj Honora Membro de UEA (1992). Li magistriĝis pri komunikado en Stanford (Usono) kaj ankaŭ studis juron en Rio, kibernetikan pedagogion en Paderborn (Germanio) kaj politikan scienccon en Parizo (Francio). Li plurjare estis funkciulo en UN, en Novjorko, kaj de Unesco, en Parizo. Li estis plurfoje premiita en belartaj konkursoj de UEA, kaj verkoj liaj aperas en diversaj esperantaj antologioj. En 1991 li ricevis la premion *Onisaburo Deguĉi* pro sia uzado de Esperanto por monda paco kaj homara feliĉo.

Senlaca batalanto por konservado de la simpleco de Esperanto, Prof. Sylla estas aŭtoro de varia bibliografio, kiu inkluzivas lernolibrojn, legolibrojn, vortarojn, diskojn, sonkaj vid-bendojn, KD-jn kaj DVD-jn. Li speciale interesiĝis pri memlernantoj, por kiuj li produktis grandan diversecon da pedagogia materialo en Esperanto cele kontentigi iliajn lernobezonojn. Pro tiuj eldonlaboroj li fariĝis pioniro en la kreado kaj publikigo de avangardaj lerniloj kaj instruhelpiloj, inkluzive ankaŭ de alfabetumo por portugallingvanoj. Lia kontribuo al la progresigo de enlanda didaktiko de Esperanto estas nemezurebla, enhave kaj grafike.

Omaĝo fare de Brazilei  
al la edukisto kiu multe  
progresigis la enlandan  
esperantan instrufakon.

Omaĝo



El lia verkaro, tre grava por progresantoj, estas la kolekto de tri facilaj legolibroj, verkitaj surbaze de listo de vortelemantoj science prezentitaj laŭ ilia ordo de ofteco kaj facileco: **Lernu Kantante** (1983) enhavas 1500 vortelemantojn; **La estonto dependas de ni** (1986) enhavas 1700 vortelemantojn, kaj **Libera Ekflugo** (1986) enhavas 2000 vortelemantojn. Al la aŭtoro plaĉis lingvaj defioj, kaj per tiu kolekto li pruvis, ke eblas verki facile pri gravaj kaj seriozaj temoj, kiel bone rimarkigas la eldoninto surdorskovrile.

La franca novelisto André Gide (1869-1951) iam diris, ke “Se oni volas scii kion la plej multaj ne scias, oni legu kion ili legis antaŭ dekoj da jaroj”. Nu, sufiĉas relegi iujn titolojn de la

aŭtoro por konstati kiel multjara kaj kohera estis lia sinteno rilate al temoj kiel paco kaj plibona mondo. Li ne preterlasis la okazon kunlevi la flagon de Esperanto pere de sia porpaca verkilaboro: **Por pli bona mondo** (1970), dulingva poemaro eldonita de Fondaĵo Getúlio Vargas, kadre de la Internacia Jaro pri Edukado, krom la du supre cititaj **La estonto dependas de ni** (1986) kaj **Libera Ekflugo** (1986), ambaŭ eldonitaj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj kadre de la Internacia Jaro de Paco.

**La estonto dependas de ni** estas vera kanto al paco kaj voko al konsciigo por konservado de nia planedo. La verko konsistas el tri kontraŭmilitaj historietoj: la



unua el ili, *Sep Leteroj*, estas emocia rakonto pri amo kaj amikeco kun elpensitaj roluloj, sed konturita per vera milita fono; la dua rakonto, *Sep Katastrofoj*, portas la leganton al ia pasinteco ne tiel malsama al nia militema mondo; kaj fine la tria rakonto, *En la Jaro 2500*, ree veturigas la leganton al tiu estonteco revata de pacamantoj. Ĉio ĉi estas plaĉa kaj interesa. Sed plej miriga estas tio, ke la leganto apenaŭ konsultas vortaron, ĉar, kiel jam skribite supre, la 100-paĝa libro konsistas el plej oftaj vortelemantoj. Relegi tiun libron estas vere plezurige.

La tria kaj lasta titolo de la serio, ***Libera Ekflugo***, prezentas pli varian enhavon kun mikso de skeĉoj, leĝeraj tekstoj, pluraj ilustraĵoj kaj poeziaĵoj. El la distraj tekstoj, mi aparte ŝatas la “duone seriozajn kaj duone frenezajn konsiderojn” pri la elpelo de Adamo el la Paradizo. Ne eblas ne kunĝui la saĝan decidon de la ĉiela ĝardenestro, antaŭ la plorema manĝinto de la malpermesata scipomo. Sciante, ke lia servisto manĝis nur unu el la scipomoj, la ĝardenestro indulgis, sed ne senigis la malobeinton je lia puno: “(...) *Vi devus manĝi ĉiom aŭ neniom. Kun neniom da scio, vi restus por ĉiam mia estimata obeema anĝelo. Kun ĉiom da scio, vi fariĝus saĝa kiel mi, kaj kapablus imiti min. Sed kun nur iom da scio vi fariĝas memfida kaj kuras antaŭen al via fina krevo. Domaĝe! Mi tre bedaŭras, Adamo, sed forpelas vin el mia paradizo. Tio ĝenas min, ĉar ĝi ne estas praktika solvo por la problemo. Mi estos ĉiam maltrankvila pri tio, kion vi faros malproksime de mi. (...) Vi rajtos reveni nur kiam vi fariĝos saĝa. Ĝis tiam, restu for, kaj atentu pri tio, kion vi faros per via malmulta scio.*”

Nu, domaĝa sceno simila al tiu pri scipomo okazas ankaŭ en nia verda paradizo. La sceno estas bone konata al vi: persono ekscias pri la ekzisto de iu kurso de Esperanto. En la difinita dato, li vizitas la kursejon. Eksciante, ke la kurso estas senpaga kaj la lernilo malmultekosta, la vizitanto sentas sin kuraĝigita kaj aliĝas al la kurso. La nova lernanto ĉeestas la lecionojn kaj, fine de la kurso, memfide decidas, ke li jam scias sufiĉe pere de tiu lernilo...

Domaĝe! Ĉu la kursestro estu same indulga kiel la ĉiela ĝardenisto?



# Provelecionoj kaj Esperanto

Dennis Keefe



Universitato de Nankino: Junio, 2009

Tri bazaj demandoj starigās antaŭ la kursgvidonto de Esperanto. Unue, kion kaj kiel instrui? Due, kiel varbi kaj enkursigi gelernantojn? Kaj trie, kiel restigi la gelernantojn kiuj finas la kurson por sekvaj esperantaj kursoj aŭ aktivaĵoj?

Mi volas pli detale ekzameni la duan demandon pri la varbado de novaj gelernantoj, kaj speciale pri la plej efika varbilo kiun mi kiam ajn spertis dum mia esperanta vivo: la proveleciono. Mi sukcese uzis tiajn lecionojn en landoj kiaj Usono, Francio kaj Ĉinio, kaj ĉiam provelecionoj efikis varbi novajn gelernantojn en poste starigitaj longdaŭraj kursoj.

Kompreneble, kursgvidanto de Esperanto povas varbi per multaj metodoj. En Madrido en la fruaj 80aj jaroj nia loka asocio de Esperanto metis multege da afiŝoj surstrate, multloke en la urbo. En kelkaj urboj oni metas anoncon en loka ĵurnalo. De tempo al tempo kurso komenciĝas post longa ekzpozicio pri Esperanto, ekzemple, en publika biblioteko. Sed alia, efika maniero varbi novajn gelernantojn estas la proveleciono.

Sed kio estas proveleciono? Ni povas difini provelecionon jene: mallonga prezentado de kelkaj elementoj de

www.linguafest.info

Esperanto por montri al publiko la naturon de la lingvo. Krome, la celo de provleciono ne estas instrui bone la lingvon, sed prezenti Esperanton alloge, por ke la gelernantoj poste havu pli favoran opinion pri Esperanto, kaj sekve de tio, enskribiĝu en tutmonata, tutsemestra aŭ tutjara kurso.

Mi unuafoje aŭdis pri provlecionoj kiam mi vizitis Esperantiston Jozefon Horvath post la Universala Kongreso en Hungario en la jaro 1983. Se mi bone memoras, li diris al mi, ke dum granda hungara festotago, eble en la unua de majo, li provlecionis al foiraj vizitantoj kaj tiamaniere kaptis sufiĉe grandan grupon por posta, pli longa kurso de Esperanto.

Mi tuj komprenis la signifon kaj la valoron de tio kion Sinjoro Horvath diris al mi pri fulmokursoj – lia nomo por provlecionoj – ne pro miaj scioj pri la lingvo Esperanto, sed pro miaj studoj kaj sperto pri merkato. Firmaoj kiuj utiligas la principaron de merkato, bone komprenas kaj uzas specimenojn, per kiuj aĉetontoj provas la guston, utilecon aŭ taŭgecon de iu varo. Tio estas, ili donas specimenojn de siaj varoj al klientoj por poste kapti ilin kaj vendi siajn produktojn. La aĉetontoj provas la var-specimenojn.

La plej sukcesa firmao vendanta malmultekostajn hejmvvarojn (sapon, ŝampuon, lavpulvoron, ktp) nomiĝas Procter kaj Gamble, kaj kutime, ĉiufoje kiam ili lanĉas novan produkton, ili disponigas *specimenojn* el tiu produkto al la publiko. Kial? Pro du kialoj. Unue, ili jam scias, per longdaŭra, antaŭ-surmerkata testado en siaj laboratorioj, ke tiu produkto estas sufiĉe bona aŭ eĉ tre bona rilate konkurencajn varojn. Due, ili scias, ke oni ne ŝanĝas aĉet-kutimojn facile; oni bezonas ian instigon por motivigi tiun ŝanĝon.

Esperanto ne estas nova marko de sapo, sed ĝi estas io nova, (almenaŭ por la bilionoj da homoj kiuj tute ne aŭ nur supraĵe konas ĝin). La personoj kiuj parolas Esperanton scias, per longdaŭra,



praktika, ĉiutaga testado, ke ĝi estas sufiĉe bona eĉ tre, tre bona ideo, sed la publiko, nia celgrupo, tute ne scias tion. Krome, nia publiko, do tiuj eventualaj gelernantoj ankaŭ, kiel sap-aĉetantoj, havas siajn kutimojn, kaj studi Esperanton ne estas unu el tiuj kutimoj. Do, provleciono povas helpi diskonigi la nocion, ke Esperanto estas bona, facila, kaj lernebla. Krome, provleciono estas bona maniero komenci ŝanĝi la lingvajn kutimojn de la publiko.

Certe, vi, kara leganto, eble protestos, dirante, *tamen Esperanto ne estas sapo! Oni ne povas kompari tian varon kun kompleksa, homcentra, kultur-riĉa lingvo!* Kaj vi pravas, sed tiu homa kutimo, provi ion antaŭ ol aĉeti aŭ utiligi ĝin estas profunde enradikiĝinta en nia alirmaniero al kio ajn nova, ĉu ni aĉetas ĝin per mono, aŭ ĉu ni akiras ĝin kiel kutimon. Prenu, ekzemple, pli valorajn varojn. Oni scias, ke la aĉeto de veturilo estas multekosta kaj riskoplena, speciale se tiu veturilo vendiĝas la duan aŭ plian fojon. Kiu aĉetus veturilon antaŭ ol li aŭ ŝi provus ĝin per almenaŭ kelkminuta veturigo?

Do estas indikoj el la fako merkatico, ke specimenoj kaj provoj funkcias por altiri novajn klientojn. En Esperantujo, aliflanke, ankaŭ abundas ekzemploj de la sukceso de provlecioj por altiri kaj varbi novajn gelernantojn. Mi jam menciis la ekzemplon de Horvath en Hungario, sed la uzado de provlecioj komenciĝis multajn jarojn antaŭe. Fakte, Andreo Cseh ofte utiligis provleciojn por altiri novajn gelernantojn. En sia biografio de Cseh, Ed Borsboom mencias kaj aludas al provlecioj kiel ofta ero de la laboro de Cseh (*Vivo de Andreo Cseh*, paĝo 65).

Ofte enskribiĝis dekoj eĉ centoj da personoj en la famaj Cseh-kursoj, kaj multaj el tiuj personoj venis pro la fakto, ke ili antaŭe spertis kaj ŝatis la provlecionon de la instruisto antaŭ ol la komenciĝo de pli longa kurso. Sed ne nur Cseh utiligis tiajn provleciojn. Preparante ĉi tiun artikolon, serĉante sur la Interreto, mi trovis plurajn raportojn pri aliaj instruistoj kiuj



utiligis provlecionojn por varbi gelernantojn. Ekzemple, en la jaro 1945, Jean Forge faris provlecionon por 300 (tricent!) personoj, kaj el tiuj 300, du trionoj poste sekvis la longdaŭran kurson (Vikipedio, Historio de la Esperanto-Klubo de Prago). Rilate la historion de provlecionoj, la plej frua mencio trovata de mi pri tiaj varblecionoj estas en la jaro 1913 en la urbo Gliwice, Pollando (Vikipedio, Gliwice).

Sed mia celo por ĉi tiu artikolo NE estas paroli pri la historio de provlecionoj, sed montri kiel ili povas efiki por altiri novajn gelernantojn. Fakte, mi kredas, ke utiligante provlecionojn, meznombro ni povas almenaŭ duobligi la kvanton da personoj kiuj komencas normalan, longdaŭran Esperanto-Kurson. Ekzistas ne pruvoj de tiu aserto, sed ni havas almenaŭ kelkajn pli modernajn indikojn.

Ekzemple, komencante per malgranda ekzemplo, en la urbeto Vendome en Francio, en la jaro 1994, mi faris duonhorajn provlecionojn de Esperanto kvarfoje en unu tago dum loka ekzpozicio de Esperanto, kaj el la eble 25 ĉeestantoj entute, preskaŭ la duono el ili pagis por havi plurajn semajnfinajn kursojn poste organizatajn de Marc kaj Daniela Noulin. En postaj jaroj en la urbo Tours, ankaŭ en Francio, mi eksperimentis per provleciono en la agrikultura foiro. Unu el miaj provlecionanoj, kiu neniam antaŭe lernis Esperanton, kelkajn jarojn poste ne nur lernis Esperanton ĝis alta grado, li iĝis prezidanto de la loka klubo de Esperanto!

Sed eble la plej bona maniero prijuĝi la efikecon de provleciono estas analizi la rezultojn el pluraj Lingvaj Festivaloj. Kial Lingvaj Festivaloj? Ĉar tia festivalo mem estas nenio alia ol granda aro da provlecionoj, en ĉiaj lingvoj, kaj kompreneble ankaŭ en Esperanto. En la originala, nun ĉiujara Festivalo de Lingvoj en la urbo Tours en Francio, laŭ unu el la lokaj Esperantistoj tie, dum pluraj jaroj ĉiuj novaj lernantoj de Esperanto en tiu urbo devenadis de la provlecionoj de la Festivalo. En Ĉeboksaro en Rusio, laŭ Aleksandr Blinov, pro la provlecionoj de Esperanto dum tiu festivalo, poste eklernis, en kutimaj kursoj, ĝis multcentoj da novaj lernantoj en la jardeko post la komenco de tiu Festivalo.

La statistiko de la provlecionoj en Ĉinio montris la saman fenomenon spertatan en Rusio. En la granda Lingva Festivalo de la Universitato de Nankino en majo, 2008, el 1462 gelernantoj kiuj ĉeestis provlecionojn de Esperanto, 250 el ili sekvis postan mallongdaŭran

kurson, kaj 57 el ili pagis sufiĉe grandan sumon da mono por ĉeesti plenan kurson daŭranta 39 horojn en la postaj du monatoj.

Tiuj modernaj statistikoj, aldone al tiuj de Andreo Cseh, liaj kunlaborantoj kaj aliaj kursgvidantoj, klare montras, ke principe, provlecionoj povas esti potenca ilo por varbi novajn lernantojn de Esperanto. Mi kredas, ke se provlecionoj sisteme okazos tutmonde, la nombro da gelernantoj de Esperanto minimume duobliĝos, kaj ke tiu duobliĝo trairos la tutan sistemon de Esperantio, Esperantujo kaj Esperantolando, kreante, supozeble, la duoblon da lernantoj kaj agantoj je ĉia nivelo de Esperanto: de la nombro de la personoj kiuj partoprenas klubvesperojn al la nombro de la membroj de UEA aŭ de aliaj esperantaj organizoj. Duoble pli da abonantoj de Esperantaj revuoj, ĉeestantoj de Universalaj Kongresoj, aŭskultantoj de niaj radio-elsendoj, ktp.

Sed, se provlecionoj povas helpi al ni kreskigi la Esperantomovadojn, kiamaniere lokaj kursgvidantoj povas fari iun provlecionon? Kion Esperantisto devas enmeti en provlecionon? Ĉu provleciono iasence egalas la unuan lecionon de tradicia kurso? Kio estas la plej bona enhavo en la provleciono? Ĉu povas ekzisti multspecaj provlecionoj?

Eble la plej bona maniero lerni fari provlecionon estas trastudi la ekzemplon de Katalin Kovats sur la retpaĝo de Ipernity ĉe <<http://www.ipernity.com/blog/edukado.net/98314>>. Vi ne nur povas legi la enhavon, vi povas ankaŭ spekti partojn de la kurso, kaj legi reagojn de multaj Esperantistoj. Mi rekomendas, ke antaŭ ol vi provos mem provlecionon, ke vi atente rigardu ĝiajn ekzemplojn. Bone rimarku, ke la celo de Katalin en ĝiaj varblecionoj ne estas instrui tradician kurson, sed altiri la gelernantojn al plua lernado. Tion ŝi faris tiutempe en Vieno per rimarkigo de [www.lernu.net](http://www.lernu.net) kaj invito al posta kurso.

Valoras la penon ekkoni la enhavon de aliaj sukcesaj provlecionistoj. Lu Wunsch-Rolshoven faras tiajn kursetojn dum la Berlina Expolingua-Foiro. Derek Roff en Usono sukcese faris provlecionon, kaj poste dum jaroj lernis kaj regule venis paroli ses novaj Esperantistoj venintaj el tiuj provlecionoj. Kiel en la kazo de Andreo Cseh kaj Jozef Horvath, mi ne konas la enhavon de tiaj provlecionoj, sed iom post iom ni povos trovi ilin kaj meti tiun enhavon sur la Interreton.




Eble valorus la penon montri al vi tion, kion mi faras dum miaj provlecioj. Vidi mian stilon povas helpi al aliaj, malpli spertaj Esperantistoj, ĉar kvankam mi estas profesia lingvo-instruisto, mi uzas simplajn metodojn dum la provlecio, kiujn nesperta instruisto povas facile kopii. Tamen, mi devas utiligi multe pli da spaco ĉi tie por klare montri al vi tiajn simplajn metodojn. Mi proponas, do, ke mi faru tion en venonta numero de ĉi tiu revuo, kaj eventuale faru filmon de miaj provlecioj. Sed ofte la ĝusta metodo ne tiom gravas. Sciu, ke dum la granda Lingva Festivalo de Nankina Universitato lastjare, mi mem tute ne faris provlecionon, ĉar mi devis estri la tutan festivalon, kaj tute ne havis tempon. Tamen, Augusto Casquero, Michel kaj Negheta Fontaine kaj Peng el Wuhan, utiligante siajn proprajn metodojn, tre sukcese faris la provleciojn dum la Lingva Festivalo, venigante centojn da provlecianoj al sekvaj kursoj.

Resume, ni povas diri, ke provlecio, alinome fulmokurso aŭ varbleciono, estas tre efika varbilo por Esperantaj kursoj. Per provlecioj loka asocio de Esperanto povas altiri pli da personoj al siaj normalaj, longdaŭraj kursoj. De la historia, pozitiva sperto de Andreo Cseh ĝis la nuntempaj spertoj de Aleksandr Blinov kaj aliaj en Lingvaj Festivaloj kaj Lingvaj Eventoj, klare videblas la rezultoj de provlecioj. Sukcesaj firmaoj ankaŭ uzas similan metodon por kreskigi la akceptadon de siaj novaj varoj. La

enhavo de provlecio estas simpla, kaj bona ekzemplo videblas en la retpaĝoj de Katalin Kovats, menciita supre. La venonta paŝo por vi, kara leganto, estas fari la unuan paŝeton mem, proponante provlecionon en via urbo. En venonta artikolo mi pritraktos pli detale eblajn enhavojn de provlecioj, kaj intertempe mi deziras bonan sukceson al vi kaj al via loka Esperanta-klubo.



# En la klason venis nova vento



Multaj kursoj de Esperanto estas ofertataj ĉiujare tra la tuta lando. En la ŝtato San-Paŭlo: ĉirkaŭ 50; en la ŝtato Rio-de-Janeiro kaj ĉirkaŭaĵo: pli ol 80; kaj en la Federacia Distrikto: ĉirkaŭ 20. Bedaŭrinde, malfacilas venigi ĝisdatajn statistikojn pri aliaj landeroj. Se en almenaŭ du aliaj partoj de la lando okazas simile viglaj instruagadoj, ni povas supozi, ke la kiomo de ĉiuj enlandaj kursejoj estas proksimume 300. Ĉar plej multaj instruistoj mem gvidas pli ol unu el tiaj kursoj, ni povas ankaŭ supozi, ke ĉiujare ĉirkaŭ 150 kursgvidantoj de Esperanto starigas la saman demandon: Per kiu

lernilo mi instruos? Responde al tiu multjara helpo-peto, kvar nomoj de enlandaj aŭtoroj de lernolibroj tuj aperas en la kapo: Jair Salles, Aloísio Sartorato, Elvira Fontes, Sylla Chaves kaj Geraldo Mattos. Estas kelkaj aliaj enlandaj aŭtoroj de lerniloj, sed iliaj metodoj malĝisdatiĝis aŭ ne bone disvastiĝis.

Iam iu sugestis, ke Brazila Esperanto-Ligo elektu, el inter tiuj popularaj lerniloj, unu lernolibron kaj ĝin rekomendu al ĉiuj enlandaj kursgvidantoj. Tio estus vera katastrofo, laŭ pedagogia vidpunkto. Cele progresigi enlandan instrufakon, ni bezonas ne unuformigon de instruado pere de iu lernilo, sed publikigon de almenaŭ pliaj dek modernaj lerniloj! Lernolibroj, kiel homoj, aperas, disvastiĝas kaj kadukiĝas. Ili ne tute mortas, sed tamen retiriĝas al plej malŝatinda el la lokoj, nome forgesiĝo. Unu tia ekzemplo estas la bonega lernolibro Ellernu! de la hungaro Ferenc Szilágyi, publikigita de Kultura Kooperativo de la Esperantistoj

en 1968. Tiu lernilo estis tre avangarda siatempe. Kurioze, foje, ankaŭ lernolibro renaskiĝas. Tio okazis rilate al la aŭdvida Kurso de Esperanto (1960) de la gehungaroj Antonie kaj Tibor Sekelj, reeldonita en 2002 de la brazilano Cláudio Spinelli, kiu komputile kolorigis kaj rearanĝis la tuton sub la nomo “Iniciação à fala do Esperanto”.

La diverseco de lernolibroj estas esenca por kontentigi la diversajn nivelojn de instrukompetenteco de la kursgvidantoj kaj de lernokapableco de la lernantoj. Ĉiu lernoĉambro estas aparta mondo, eĉ se sama lernilo estas plurloke kaj plurfoje adoptata. Ĝuste tiu manko de elekteleco de profesiaj lerniloj motivigas la paralelan eldonadon de ‘memfaritaj metodoj’ kaj la bone konatan disdonadon de fotokopiitaj ‘kromlegaĵoj’. Ne kontentaj pri la uzado de iu lernolibro, estas nature, ke kursgvidantoj testu aliajn lernilojn aŭ mem provu krei unu tian. Aliflanke, kursgvidantoj, ne komprenante la funkciadon de iu adoptita lernilo, ĉiam opinias, ke mankas lernomaterialo.

En ambaŭ supre menciitaj ekzemploj, ja mankas al tiuj kursgvidantoj trejnado fare de kompetentaj koncernuloj. Malmulte valoras reklami, ekzemple, ke iu aŭtoro de lernolibro sukcese uzis sian metodon dum pli ol dek jaroj, se tiu sperto ne atingas la novajn uzantojn de lia lernilo. Samkiale, ĉu efikas reklami, ke iu lernolibro baziĝas sur plej modernaj instruteknikoj, se tiuj teknikaj konoj apenaŭ estas konataj al okazaj uzantoj de la koncerna lernilo?

Per tiu ĉi iom longa enkonduko mi celas prezenti al la legantoj de Brazilei la publikigon de nova lernolibro: Esperanto por lernejoj klasoj, verkita de la brazila lingvinstruisto Josias Barboza, el Braziljo, kaj kuneldonita pasintjare de Unio Planeda kaj Brazila Esperanto-Ligo. Pri ĝi jam aperis bonklariga artikolo (Brazilei 08/2008, pp 38-46) verkita de Prof. Paulo Nascentes. Kion interesa do mi povus aldoni? Certe nenion pli, se oni ne estus sendinta al nia redakto pakaĵon enhavantan lernolibron, gvidlibron kaj du KD-jn. La kompletoj impresas grafike kaj kvalite. Pri la grafika aspekto de la lernilaro respondecas la grafikisto Elisa Simas, jam konata de la esperantistoj i.a. pro sia valora kontribuo al la grafikaranĝa plibonigo de la revuo Brazila Esperantisto. Pri ĝia eldonkvalito respondecas la jam menciitaj kuneldonantoj, kiuj ne ŝparis rimedojn por prezenti al la publiko kiel eble plej allogan materialon. Ambaŭ kompletoj (lernolibro plus son-KD por la lernanto kaj gvidlibro





plus son-KD por la instruisto) estas interne koloraj kaj bunte ilustritaj. La lernolibro havas 152 paĝojn (la gvidlibro iom pli, 166) kaj mezuras 20 x 28 cm, same kiel la instruista libro. Resume, laŭ aspekto, la nova lernolibro estas komparebla al plej modernaj lerniloj de etnolingvoj.

Koncerne la metodon, laŭ klarigo mem de la aŭtoro, ĝi estas rekta, konversacia, grupa, ludiga, paroliga kaj negramatika. La enhavo de la nova instrumaterialo estas rikolto de plurjaraj enklasaj spertoj (espereble iam seminare aŭ filme transdoneblaj) fare de la aŭtoro, en Brazilo kaj en Ĉinio.

La tuto aspektas tiel plaĉe aranĝite kaj bone programite, ke mi iom bedaŭras tion diri: Esperanto por lernejoj klasoj ne estas instrumaterialo por la nuntempo, sed por la estonteco (almenaŭ de nia enlanda Esperantomovado). Tiu observo tamen ne estas kritiko, sed laŭdo, kiun mi tiel pravigas:

Unua (kaj laŭ mi, plej grava) pravigo: Uzado de tiu instrumaterialo postulas, ke kursgvidantoj por ĉiam rezignu pri sia kutima posteno de 'instruadoro' kaj anstataŭe alprenu la gvidadon de la klaso kiel reĝisoro en filmado. Ja 'instruadoroj' strebas montri al siaj lernantoj kiel perfekta estas la gramatiko de Esperanto. Tute male, instrureĝisoro strebas al tio, ke liaj lernantoj kiel eble plej perfekte parolu la lernatan lingvon. Tial mi kredas, ke kelkaj kursgvidantoj ne facile sukcesos uzi la novan instruilon sen antaŭa trejnado.

Dua pravigo: Rilate al la kiomo da lernantoj, por ĉiu klaso, la aŭtora rekomendo estas minimume 12 kaj maksimume 22. Nuntempe, escepte en tre maloftaj okazoj, ni apenaŭ trovas instrulokon en tiel favora situacio. Do parodie al titolo de libro de nia karmemora prof. Sylla Chaves, mi dirus, ke la estonto de lernejoj

klasoj dependas de vasta propagando de Esperanto (preferinde en universitata medio). Por scii kial preferinde en tia medio, saltu tuj al la tria pravigo.

Tria pravigo: La prezo de la lernolibro plus son-KD estas R\$ 50,00 (kvindek realoj). Se ni konsideras, ke instruado de Esperanto en kluboj kaj asocioj nialande plej ofte okazas senpage (inkluzive de la lernilo, se ĝi estas preparita de la kursgvidanto mem), ni povas kompreni kial kluboj kaj asocioj de Esperanto ne tuj simpatias al la nova instrumaterialo. Male, en universitatoj, la tieaj lernantoj ŝajne jam estas kutimiĝintaj al siaj multkostaj lerniloj. Bonŝance, per sia verko la aŭtoro celas ne nur enlandajn kursejojn, sed ankaŭ tiujn alilandajn, kie espereble la kompletoj plej multe vendiĝos. Sed ni revenu al la realaĵo de nia enlanda eldonmerkato kaj demandu nin ĉu la prezo de esperantaj eldonaĵoj estas multtekostaj. Kiel jam dirite, Esperanto por lernejoj grafike kaj enhave estas komparebla al plej modernaj etnolingvaj lerniloj, kies titoloj tamen estas eldonitaj je miloj da ekzempleroj, dum tiuj esperantaj eldoniĝas nur je kelkcentoj da ekzempleroj. Komparu mem kaj pripensu ĉu ne valoras la penon pagi por helpi al la progresigo de nia enlanda instrufako.

Kvara pravigo: Ankaŭ laŭ rekomendo de la aŭtoro, la novan instrumaterialon oni gvidu dum du sesmonatoj po du lecionoj (preferinde tri) semajne. Nunaj interesiĝantoj pri Esperanto ŝajne ne konsideras ĝian lernadon prioritata afero, por liveri tiom da tempo. Envere, la tuta kurso konsistas el du lernolibroj (la dua libro lanĉiĝos okaze de la ĉi-jara Brazila Kongreso de Esperanto) kaj estas planita por daŭri proksimume 150 horojn, alidirate, dum kvar sesmonatoj.

Kvina pravigo: Pro la novigo mem de la instrupropono de Esperanto por lernejoj klasoj, la aŭtoro zorgis, ke la reĝisoroj de sia instrumaterialo ne multe baraktu dum la gvidado de la lecionoj kaj pretigis gvidlibron kun marĝenaj notoj, sugestoj kaj rimarkoj, kaj ankaŭ KD-on kun presebla help-materialo. Aldone al tio, la aŭtoro ankaŭ estigis retejon <<http://www.lernejojklasoj.net>> cele plu servi la kursgvidantojn. Tiuj novaĵoj estas ja tre bonvenaj, sed, laŭ mi, ankoraŭ ne sufiĉaj por garantii sukceson de la metodo sub reĝisorado, ekzemple, de tradiciemuloj. Kiuj jam profesie gvidas kurson pri iu moderna lingvo, certe trovos la instrumaterialon tre hejmeca. Kiel mi jam diris supre, en la enkonduko,

la instruistaro bezonas ne nur profesion instruilaron, sed ankaŭ profesion trejnadon. Mi konstatas, kun ĝojo, ke la aŭtoro ŝajnas tre zorgema pri la sukcesa uzado de sia instrumentado. La publikigo de la menciita retejo estas promesdona ekzemplo. Ni ne miru do, se baldaŭ tie anonciĝos trejnkursoj por interesiĝantoj testi la novan instrumaterialon.

Gratulon do al la aŭtoro, eldonistoj kaj ceteraj kunlaborantoj. Laste, por ke oni ne taksu min instiganto de la prokrastita sukceso de la recenzata materialo, mi memorigas, ke ĉiumatene ni estas unu tagon pli proksimaj de la estonteco. Sciante pri tiu sukceso-arimetiko, oni povas decidi mem pri kiom da tagoj oni pretas labori por sukcesigi iun celon.

## Korespondservoj senpagaj kaj allogaj

Korespondado estas interesa kaj efika maniero estigi okazojn por ke lernantoj praktike uzu la lernatan lingvon. Unu el plej kompletaj adreslistoj por retuzantoj estas alirebla per la retejo <[www.edukado.net](http://www.edukado.net)>. Serĉu tie, en la ĉefmenuo, la sekcion ‘Korespondservo’. Ĉi-momente la tiea adresaro konsistas el 38 grupaj kaj 558 individuaj korespondpetoj el 64 landoj.

Freŝdate ekfunkciis nova korespondservo por la tutmonda esperantistaro. Ĝin iniciatis la redaktoro de la revuo “**Komencanto**”, Viktor Kudrjavcev, kiu baptis la servon per “Korespondservo Universala” (KSU).

Jen ĝia adreso:

***<http://esperanto-plus.ru/korespondservo>***

Venigu la mondon de Esperanto en vian kursejon. Viaj lernantoj tion meritas!

# Surprize kurioza

## kaj instrua prelego

Joseo tenorjo

Ĉu vi jam aŭdis pri teorio de lingvakirado surbaze de ‘silenta periodo’? Mi neniom sciis pri tio, ĝis la pasinta majo, okaze de prelego prezentita de Guilherme Souto Jardim, el urbo Charqueada/SP, pri la temo “Kiel flue paroli Esperanton”. La preleganto informis, ke li ree vizitadas fakultaton, ĉi-foje pri Beletro, kaj ke lia tiea konatiĝo kun avangardaj lingvistikaj esploroj pri akirado de fremda lingvo lin instigis elekti la proponatan temon.

La kuriozan kaj mallongan prezentadon oni povas tiel resumi: estas granda eraro supozi, ke por paroli fremdan lingvon nepras parolekzerciĝi jam en la unua leciono, kiel en la tradiciaj lingvaj kursoj. La ŝlosilo por sukcesa akirado de dua lingvo inkluzivas ian ‘silentan periodon’, kiu povas daŭri eĉ monatojn, kaj dum kiu lernantoj estas malpermesataj paroli en la cellingvo. Dum tiu ‘silenta periodo’, la lernantoj estas instigataj nur aŭdi la cellingvon per kiel eble plej multaj rimedoj. Post tiu silenta komprenekzercado, la preleganto garantiis, ke vera magiaĵo tiam okazas, nome la silentulo subite kaj surprize flue ekparolas la lernatan lingvon.



Guilherme S. Jardim prelege en ERUSP-evento

Tiel dirate, oni ne povis ne konsideri la eblecon, ke tiu metodo konvenas ankaŭ al la por ĉiama mortigo de krokodiloj: balbutantoj de nun povos sin pravigi per pli ĉarma esprimo “mi ankoraŭ estas en silenta periodo”...

Kiel atendite, ĉio nova estas akceptata per iom da singardemo kaj ŝercemo. La singardemo estas memkomprenebla kaj la ŝercemo povas iĝi valora ilo dum serĉado de la vero. Bedaŭrinde la preleganto ne havis tempon prepari pli kompletan materialon por iom kontraŭstari nian singardemon kaj ŝercemon, sed dankinde li malfermis al ni pardonon al esplorinda temo. Kaj tion mi plezure faris kaj nun ĝin iom dividas kun vi.

## Hipoteza Vojo

Ju pli teknologio evoluas, despli evoluas teorioj pri dualingva akirado. Multaj tiaj teorioj baziĝas sur plurjaraj esploroj, kiuj ampleksas diversajn kampojn kiel lingvistiko, psikologio, sociologio, neŭrolingvistiko k.a.. “silenta periodo” estas unu tia hipotezo, kiu siavice konsistigas komencan stadion en laŭŝtupe kontinua lernado-teorio — cetere, defendata de multaj nuntempaj teoriistoj. Laŭ tiu teorio, lernado dividiĝas je stadioj plej ofte identigitaj kiel:

**Unua stadio: *Silenta/Akcepta aŭ Antaŭprodukta Stadio***, kies daŭro povas esti dekhora ĝis sesmonata. Tiu ĉi stadio ofte inkluzivas ian ‘silentan periodon’, dum kiu lernantoj ne povas paroli en la cellingvo, sed nur respondi diversmaniere, ekzemple per monstro al iu objekto, bildo aŭ persono; per pantomimo cele montri agojn kiel starigi aŭ (mal)fermi pardonon; per mangestoj aŭ kapjesoj; aŭ per respondo de simpla “jes” aŭ “ne”. Instruistoj ne devas postuli, ke lernantoj parolu, ĝis ili estos sekuraj fari tion. En tiu stadio, la vortstoko de la lernantoj superas 500 “akceptajn” vortojn, kiujn ili povas kompreni, sed ne povas uzi ilin senĝene. Ili ankaŭ povas kompreni novajn vortojn, se oni ilin igos kompreneblaj al ili.

**Dua stadio: *Komence Produkta Stadio***, kiu povas daŭri ses monatojn, post la antaŭa stadio. Du-stadiaj lernantoj konas ĉirkaŭ mil akceptajn/aktivajn vortojn, per kiuj ili povas ofte eldiri unu- aŭ du-vortajn frazojn, kaj ankaŭ kapablas kompreni novan materialon aldone de mallongaj respondoj per simpla jes/ne aŭ per demandaj korelativoj (kiu/kio/kie).

**Tria stadio: *Parole Vigla Stadio***, kiu povas daŭri plian jaron, kaj kies lernantoj povas uzi mallongajn frazojn kaj simplajn propoziciojn por komunikiĝi, surbaze de ĉirkaŭ tri mil konataj vortoj. Tria-stadiuloj ekdialogas per simplaj demandoj (kiel “Ĉu mi povas iri al la necesejo?”) kaj respondoj. Ili ankaŭ povas produkti pli longajn frazojn, sed ofte kun gramatikaj eraroj, kiuj povas malhelpi ilian komunikadon.

**Kvara stadio: *Meze Lingvo-Lerteca Stadio***, kiu povas daŭri plian jaron post la antaŭa stadio. En tiu stadio, la vortstoko de la lernantoj estas ĉirkaŭ ses mil vortoj, per kiuj ili komencas fari kompleksajn vortumadojn, esprimi opiniojn, demandi pri klarigoj, kundividi siajn pensojn kaj paroli pli longe.

**Kvina stadio: *Perfektige Lingvo-Lerteca Stadio***, en kiu lernantoj disvolvis vortprovizon pri iu faka kampo, kaj povas plene partopreni laŭgrade enklasajn aktivadojn apoge de okaza helpaldono. Kvin-stadiuloj povas paroli la duan lingvon per gramatikaj kaj vortaj strukturoj kompareblaj al tiuj de samaĝaj denaskuloj.

## Kio pri ‘silenta periodo’?

Per observado kaj esploroj pri akiro de dua lingvo fare de infanoj, la usona pioniro pri dualingva akirado, Stephen Krashen, malkovris, en 1985, ke en la komenca stadio de lingva alproprigo ekzistas ia ‘silenta periodo’, dum kiu infanoj restas silentemaj kaj koncentritaj je kompreniĝo. Kompreneble ili povas respondi, se necese, sed nur per gestoj aŭ per uzo de parkeritaj frazoj. Tia fenomeno estas ankaŭ observata ĉe infanoj akirantaj la gepatran lingvon. Bebo foruzas plurajn monatojn aŭskultante la ĉirkaŭantajn personojn antaŭ ol ĝi eldiros simplan vorton. Ĉar komprenado ĉiam antaŭiras paroladon, en natura

procezo de lingvakirado, kelkaj dualingvaj metodistoj kaj instruistoj venas al tia hipotezo, ke, en la unua periodo de lingvolernado, lernantoj ne estu devigataj respondi en la cellingvo, sed nure koncentriĝi pri kompreno. Ili kredas, ke la estiĝo de ia ‘silenta periodo’ en lernoĉambro estus je valora utilo por faciligi la akiradon de fremda lingvo. Luj eksperimentoj estis faritaj cele testi la hipotezon pri ‘silenta periodo’, kaj la raportitaj rezultoj ŝajne konsistigas argumentojn favorajn al la ‘silenta periodo’ en komencaj stadioj de dualingva lernado, eĉ en formala medio. Ankaŭ estas kelkaj esploristoj, kiuj disvolvis instru-strategiojn bazitajn sur tiu hipoteza ‘silenta periodo’.

## Ĉu valoras la penon prokrasti parolekzercon?

Tiu ‘silenta periodo’ tute ne estas unudirekta kaj pasiva, kiel unuamomente oni emas supozi. Ja temas pri tiel aktiva kaj interaga periodo, kiel tiu okaze de parolado mem. La nura diferenco rilatas al tio, ke dum tiu ‘silenta periodo’ la lernantoj esploras diversajn aliajn esprimmanierojn: fizike, skribe, pantomime k.a. Indas memoriĝi, tamen, ke lingvakirado ne efikas per aŭskultado de informo, kiun la lernanto ne komprenas. Alidirate, tio signifas, ke ankaŭ la instruisto devas mem, per ĉiaj rimedoj, igi komprenebla tion kion li/ŝi diras. Same grave estas elekti plej taŭgan modelon de neparola respondo akorde kun la aĝo kaj lernostiloj de la lernantoj.



**Stephen Krashen**, Honora profesoro ĉe Universitato de Suda Kalifornio kaj eduka esploristo, naskiĝis en Ĉikago, Ilinojo, en 1941. Krom ikono en la lingvistika kampo, li ankaŭ estas pioniro en esplorado pri dualingva lernado. Lia vasta bibliografio konsistas el pli ol 350 laboraĵoj kaj libroj publikigitaj. Li famiĝis tutmonde i.a. pro la formulado de sia teorio pri Akirado de Dua Lingvo.

Evidentiĝas do, ke tiu metodo estas tiel laboriga, kiel la fama rekta metodo: la instruisto devas prepari varian kaj enhav-riĉan instrumaterialon. Konsekvence, kreemaj kaj bonaj regantoj de la cellingvo plej konvenas por gvidi lecionojn kadre de 'silenta periodo'.

Se bone komprenita la celo de tiu stadio, kaj adekvate programita la enhavo de instruaktivadoj, supozeble oni riskas sukcesi en la preparado de lernantoj al la posta stadio. Eĉ se tiu hipotezo pri 'silenta periodo' koncernas ĉefe infanojn, dum akirado de dua lingvo, oni ne povas ne konsideri almenaŭ unu pozitivan punkton okaze de ĝia enkonduko en lernoĉambron por plenaĝuloj, nome, ke la kursanaro lernos sub malpli prema mensstreĉiteco.

Laŭ teoriistoj pri 'silenta periodo', ne estas profiteble de komence ekzercigi lernantojn parole, ne haviginte al ili antaŭe iom da tempo por ke ili kutimiĝu al la novaj sonoj de la cellingvo. Tiu komenca ripeta parolekzerco, en tradiciaj lingvokursoj, ne reprezentas la aŭtentan cellingvon, sed ian lernoĉambran dialekton kun ĉiaj eblaj misoj. Ankoraŭ laŭ defendantoj de la hipotezo pri 'silenta periodo', tio ne okazas en prokrastite parolekzerca gvidado, ĉar antaŭe lernantoj tre atente aŭskultas sian instruiston kaj/aŭ registritajn parolojn, kaj nur poste ili reproduktos ilin, tiel aŭtente kiel ilin produktis la parolfonto.

Per siaj esploroj kaj eksperimentoj, teoriistoj pri dualingva akirado celas faciligi al interesiĝantoj la alproprigon de etnolingvoj, ĉefe la angla. Ĉar Esperanto jam estas regula kaj rapide lernebla lingvo, mi ekdemandas min, ĉu ankaŭ ni ne povas iom profiti je tiaj eksperimentoj kaj igi nian laboron pli agrabla kaj efika. La koncerna bibliografio estas tre vasta kaj la temo vere interesa. Ĉu iu pretas preni la fadenon kaj daŭrigi la esploradon?

Fontoj:

<http://www.nwrel.org/request/2003may/overview.html>

<http://effortlessacquisition.blogspot.com/2004/06/silent-period-teaching-methods.html>

Tomioka, Taeko. 2003. *The Silent Period*. <http://www.homepage3.nifty.com/park/silent.htm>



## Trejnaraĝo por kursgvidantoj de Esperanto



Okazis en la urbo Barra Mansa/RJ, la 28-an de marto 2009, la 1-a Trejnado por Kursgvidantoj de Esperanto, organizita de Nia Espero Esperanto-Grupo (NEEG) apoge de la ŝtata E-asocio AERĴ.

17 vizitantoj el ses urboj ĉeestis la trejnadon, kies ĉefa

kontribuo venis el la partopreno de la pedagogino Aparecida Soares, kiu prezentis la duan parton de kompilita materialo pri metodologioj kaj instruteknikoj. Ĉiuj ĉeestantoj ricevis broŝureton kun la enhavo de ŝia prezentado.

Malfermis la trejnadon Silvio Marcio, unu el al organizantoj gvidantoj de NEEG, per aranĝo de la temo “Interpersonaj Rilatoj”, tiel preparante la etoson de la medio por la prezentado de la pedogogino speciale invitita por la trajnararĝo.

Ankaŭ ĉeestis la trejnararĝon la invititaj aŭtoroj de lerniloj, Jair Salles kaj Aloísio Sartorato, kiuj parolis pri siaj respektivaj popularaj lernolibroj, nome “*Esperanto Conversacional*” (J. Sales) kaj “*Esperanto para Principiantes*” (A. Sartorato).

Tiu 1-a trejnado por kursgvidantoj de Esperanto, en la urbo Barra Mansa, estas pozitiva spuro de persista laboro de la anoj de EKOR (Esperantista Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono), kiu jam sukcese okazigis 11 tiajn trejnararĝojn en Rio-de-Ĵanejro. Tre optimisme, Silvio Marcio diris: “Ni esperas, ke tiu estas la unu el multaj trejnararĝoj celantaj multobligantojn de la neŭtrala kaj internacia lingvo Esperanto”.

Ĝuste en marto, sub la eldonmarko de Brazila Esperanto-Ligo, aperis la 9-a eldono de la populara lernilo “Esperanto para principiantes” de Aloísio Sartorato. La libro unuafoje aperis en 1986 kiel fotokopiaĵo. Kvin jarojn poste la aŭtoro aperigis ĝin libroforme, kaj de tiam jam eldoniĝis 10 mil ekzempleroj de la lernilo. Laŭ la kalkulo de la aŭtoro, pli ol 11 mil homoj jam lernis per lia lernolibro. Li sprite demandas: kie estas tiuj lernantoj?!

## Komentoj: Paulo Sérgio Viana

Jorge Amado estas brazila aŭtoro konata pro sia pasioplena, emociintensa stilo kaj temoj. Liaj frazoj estas fortaj, viglaj, foje eĉ patosaj. Li uzas multajn adjektivojn kaj emas ripeti skuajn metaforojn. Tradukanto devas atenti tiujn trajtojn de liaj tekstoj. En la nun proponata defio, prenita el unu el liaj plej fruaj romanoj “Teroj de Senfino”, la frazoj foje erarigas la tradukanton, ĉefe pro la akuzativoj: verboj petas siajn akuzativojn foje longe for de si. Kaj oni perceptas, ke la kandidatoj stumblis ĉe ili. Vidu la frazojn:

*“Sed Juka Badaró ne vidis antaŭ vi la praarbaron, la komenco de la mondo.”* (Oni devus preferi: “... ne vidis antaŭ SI la praarbaron, la komencoN de la mondo.”)

*“La sovaĝejon ilumigita per fulmoj li ne plu vidis antaŭ si, plenaj de strangaj bruoj, interplektita per lianoj, malaperta per centjaraj arboj, loĝejo de fantomoj kaj sovaĝaj bestoj.”* (Mi preferus: “La sovaĝejon prilumitan de fulmoj li jam ne vidis antaŭ si, plenaN je strangaj bruoj, implikoplenaN de lianoj, dense kovritaN de centjaraj arboj, la komencoN de la mondo.”)

Aliaj iom naivaj mistradukoj, trovitaj en la tradukoj proponitaj:

*“antaŭ”*, anstataŭ *“antaŭe”*;

*“li nek atentis”*, anstataŭ *“li eĉ ne atentis”*;

*“estus tie”*, anstataŭ *“estos tie”*;

*“terenon pli bona”*, anstataŭ *“terenon (grundon?) pli bonaN”*.

Se la tradukantoj pardonos min, mi petus, ke ili iom pli poluru siajn tradukojn, antaŭ ol BRAZILEI povos premii ilin.

Bedaŭrinde ĉi-foje neniu el la tradukoj kontentige sin prezentis al la kontrolanto, surbaze de kies komentoj ni aljuĝas neniun premion. Ni dankas kaj kuraĝigas la partoprenintojn plu ekzerciĝi en tiu malfacila, sed instrua okupo.

Diable,  
Kio okazas al mia hundo,  
ke ĝi ne sukcesas paroli?  
Mi komencas dubi pri tiu  
'silenta periodo'...



Joseo



# ZAMENHOF-A JARO



D-ro L. L. Zamenhof  
(1859 - 1917)

La kreinto de Esperanto havas  
interesan historion por rakonti  
okaze de la 150-jara jubileo  
de sia naskiĝtago...

... kaj vi havos la tutan jaron 2009 por  
rerakonti ĝin al viaj lernantoj!